



*La LKK de la UK en Montrealo*

# La Universala Kongreso en Montrealo prokrastita al la jaro 2022

*Gazetara Komunikado de UEA n-ro 862 (2020-04-11)*

UEA esperas, ke ĉiuj bone fartas. La sano de la kongresanoj kaj de ĉiuj homoj estas por ni la plej alta prioritato. Post zorga konsiderado de ĉiuj aspektoj de la koronavirusa tutmonda epidemio kaj ĝiaj sekvoj, la Estraro de UEA, la Centra Oficejo, LKK kaj la kongresejo en Montrealo venis al la konkludo, ke tute ne estus sekure kaj prudente okazigi la UK-on en Montrealo en 2020. Cetere, laŭ la novaj pli striktaj reguloj de la kebekia registaro, je nia granda bedaŭro en 2020 ne eblas okazigi Universalan Kongreson de Esperanto.

Pro tio la Estraro de UEA unuanime decidis prokrasti la Universalan Kongreson en Montrealo al la jaro 2022.

Ni kore dankas al la Loka Kongresa Komitato (LKK),

kiu dum jaroj obstine laboris por organizi la Kongreson kaj pretas daŭrigi la laborojn por la UK en Montrealo en la jaro 2022.

Ĉiu aliĝinto estis rekte informita de la Kongresa Fakto de UEA rilate la prokraston al 2022, la aŭtomatan nuligon de mendoj kaj la repagojn.

Por ke la esperantistoj tamen havu la okazon sperti grandan internacian aranĝon en tiu ĉi jaro, estas planata virtuala evento en la monatoj julio-aŭgusto, kiun povos partopreni ankaŭ tiuj, kiuj ne planis veni al Montrealo.

Pliaj informoj pri tio

aperos en sekvaj komunikoj de UEA.

[uea.org/gk/862a1](http://uea.org/gk/862a1)

The screenshot shows the homepage of the Universala Esperanto-Asocio (UEA). The header includes the UEA logo and the text "(en oficialaj rilatoj kun UN kaj Unesko)". Navigation tabs include "Allĝoj", "Kongresoj", "Delegita reto", "Revuoj", "Katalogo", and "Via spaco". A secondary navigation bar has "UEA?", "Aktuale", "Asocio", "Strategio", "Landoj", "Fakoj", "TEJO", and "Teko". The main content area features a search bar and a "Aktualaj novaĵoj" section. A prominent pink banner at the bottom of the news section reads "UK en Montrealo movita al 2022" and contains the text: "Pro la monda epidemio kaj neeble okazigi la UK-on en Montrealo ĉi-jare, bedaŭrinde en 2020 ne okazos Universalan Kongreson. La Universala Kongreso en Montrealo estis movita al la jaro 2022. La UK-2021 okazos en Belfasto, Nord-Irlando."



## Mesaĝo de la LKK por la Montreala UK

**Tiu ĉi mesaĝo estis afiŝita en [Facebook de la LKK](#) post la anonco pri la prokrastigo de la montreala UK pro la pandemio de koronaviruso**

« Karaj amikoj, vi vidis la komunikon de UEA ([uea.org/gk/861a1](http://uea.org/gk/861a1)). Vi eble devas scii, ke ni, la LKK por la UK en Montrealo, en konsultiĝo kun la kongresa kuracisto, kaj ankaŭ kun la unuanima subteno de la estraro de Kanada Esperanto-Asocio, faris rekomendon al la estraro de UEA prokrasti la UK-on en Montrealo, pro la koronavirusa pandemio, kiu eble ankoraŭ daŭros longan tempon. Jes, ni laboregis de pluraj jaroj por sukcesigi la UK-on en Montrealo, sed por ni plej gravas ke la sano kaj vivoj de ĉiuj kongresanoj, kanadanoj kaj homoj tra la tuta mondo estu sekuraj. Sciu, ke la LKK ankaŭ unuanime konsentis daŭrigi la laboron por okazigi la UK-on poste (sekvu la komunikojn de UEA). Ni esperegas ke la


montreala kongreso okazos eĉ pli granda ol ni originale planis, kaj en la plej sekuraj kondiĉoj, kun esperantistoj el ĉiuj landoj. Ni esperas, ke tiuj, kiuj planis veni al Montrealo, venos, kaj ankaŭ tiuj kiuj ne pensis veni ĉi-jare, ankaŭ venos poste. Ĉe ni en Kebekio, dum ĉiuj estas hejme pro la epidemio, estiĝis tradicio afiŝi en la fenestroj, sur la pordoj, en la vitrinoj de la fermitaj vendejoj ĉielarkojn, kun la skribaĵo « Ĉio iros bone » - « Ça va bien aller ». Jes, ĉio iros bone, kaj la ĉielarko venos post la pluvo. Ni sendas al vi niajn plej varmajn salutojn el Montrealo kaj deziras al vi kaj viaj familioj esti kaj resti sana, kaj esperi, kaj... atendi ĉielarkon -- ĝi venos, sendube ! »

# Kolekti ĉielarkojn

*Ĵenja Amis*

Fine de aprilo mi devis viziti kuraciston. Mi ne prenis la metroon — mi simple promenis laŭ la stratoj de mia kvartalo en Montrealo kaj dumvoje mi « kolektis ĉielarkojn ! » Jen kelkaj el ili : mi donacas ilin al vi ĉiuj, kie ajn vi loĝas. Mi esperas, ke ĉio bonas ĉe vi kaj ĉe viaj familioj ! Mi ankaŭ kunmetis ilin en [videeton](#), laŭ la muziko de nia fama montreala komponisto kaj kantisto, Leonard Cohen, kiun tiom bele kantis Ĵomart kaj Nataŝa dum la UK en 2017 en Seulo !





# La montreala UK prokrastita

*Ĵenja Amis*

Se iu dirus al mi antaŭ kelkaj monatoj, ke la UK ne povos okazi, mi certe ne kredus... La UK-oj okazas ĉiujare, nur escepte de la du Mondmilitoj... Nur dufoje en la pasinta jarcento estis UK antaŭpreparita sed devis esti nuligita : 1914 en Parizo, kaj 1967 en Tel-Avivo, ambaŭ pro milito... Ni estas tristaj, ke la Montreala UK, kiun ni preparas jam de pluraj jaroj, malfeliĉe, devas prokrastiĝi pro la pandemio de koronaviruso...

La 30-an de januaro aperis la reta versio de la Dua Bulteno pri la Montreala kongreso, kiun UEA kaj LKK preparas jam de monatoj. En la sama tago, la Monda Organizaĵo pri Sano (MOS) deklaris epidemion de koronaviruso – la 11-an de marto MOS nomis ĝin pandemio... Nur unu tagon poste (la 12-an de marto), mi iris al mia (jam preskaŭ malplena) laborejo, la Nacia Filmoficejo : preskaŭ ĉiuj « neesencaj » oficejoj, lernejoj ktp. estis jam fermitaj tra Kebekio. Tiu vendredo, la 13-a, estis la lasta tago, kiam mi povis eniri en mian laborejon.

Post iom da tagoj ĝuste tie, sub la fenestroj de mia laborejo, en la koro de la urbocentro de Montrealo, sur la fama Festivala Placo, en la Kvartalo de Spektakloj, malfermiĝis la testocentro por KOVIM-19 : kelkaj grandaj blankaj militecaj tendoj, kiuj staras en la lokoj, kie normale tra la tuta somero estas scenejoj, glaciaĵejoj kaj kien venas dekoj da miloj da homoj, kun familioj, por ĝui la faman montrealan someron de muziko, dancoj, ridoj kaj amuziĝoj.

En la sama vespero, la 13-an, mi helpis al la UEA-

estraranoj Amri Wandel kaj Aleks Kadar (ĉe ili jam estis profunda nokto) pretigi la komunikon de UEA : oni plilongigis la duan aliĝperiodon ĝis la fino de majo pro la koronaviruso. En tiu momento, la intenco estis okazigi la UK-on kiel planite. Al la kongreso aliĝis jam pli ol 800 personoj...

La 21-an de marto, mi dissendis la sekvan numeron de *La Riverego*, la revuo de Esperanto-Societo Kebekia. La ĉefa temo de la numero : ekskursoj por la UK-2020. Mi ofte ricevas respondojn de diversaj homoj, komentojn, laŭdojn ktp. Ĉi-foje estis silento – venis nur unu reago de kara amiko nia el Japanio : « Mi esperas, ke baldaŭ la virus-afero kvietiĝos », li skribis...

La sekvan tagon – la 22-an de marto – aperas la dekreto de la Kanada registaro : fermi la landlimon, ĝis almenaŭ la 30-a de junio. Sekvajn tagojn – sekvaj avizoj de la kanada kaj la kebekia registaroj : devigo de izoliĝo, kvaranteno por ĉiuj kiuj revenas el eksterlande, malpermeso de ĉiuj publikaj kunvenoj... Prokrasto de la Someraj Olimpikoj, nuligo de amaso da famaj montrealaj eventoj, kiel Festivalo de Ĵazo... Intertempe, la kvanto de infektiĝoj en la mondo kalkuliĝas je centmiloj, kaj

nia urbo, bela urbo, Montrealo, fariĝas la epicentro de la epidemio en Kanado... Bonŝance, niaj malsanulejoj bone eltenas – Usono, nia najbaro, kie loĝas multegaj amikoj kaj ankaŭ familianoj, kaj de kie venis la plejparto de niaj kongresanoj, spertas profundan krizon : la hospitala sistemo de Novjorko estas rande de kolapso...



Sekvas senfinaj mesaĝoj inter la LKK-anoj, inundo de demandoj de esperantistoj de ĉie en la mondo, la konkludo de la kongresa kuracisto, ke la ŝancoj, ke la UK povus okazi « sufiĉe normale », estas malpli ol 10%. Kaj fine, la kriz-kunveno kaj la doloriga sed sobriga, unuanima konkludo de LKK, fine de marto, ke la UK-2020 ne povas kaj ne devas okazi en 2020, kaj la rekomendo al la UEA-estraro prokrasti la

Montrealan UK-on... « Sed nun ni estos la plej sperta LKK iam ajn ! », ŝercas unu el niaj teamanoj. Ni ridas, eĉ se ni estas tute elĉerpitaj : fizike kaj mense.

La registaro de Kebekio nuligis, la 10-an de aprilo, ĉiujn kulturajn kaj sportajn eventojn tra somero, kaj la registaroj – de Kanado kaj de Kebekio –

planas daŭre limigi la fizikajn kontaktojn inter homoj, praktiki kvarantenojn kaj limigi la vojaĝojn por eviti pliajn ondojn de infektiĝoj : la krizo povas daŭri ankoraŭ pli ol jaron, laŭ la modeloj de la kanada registaro. Espereble, la aferoj boniĝos en la venontaj semajnoj kaj monatoj, kaj ni esperu, ke oni rapide eltrovos vakcinon...

La UK-2020 jam eniris en la historion – ne tiel kiel ni pensis, bedaŭrinde... Sed ni esperas, ke la Montreala UK eniros en la historion kiel la renaskiĝinta kongreso – la ĉielarka kongreso. Sciu, ke via montreala LKK ne forlasas vin – ni dankas al ĉiuj, kiuj aliĝis kaj kiuj aliĝos. Ni daŭrigos laboron por vi, post ioma paŭzo, kaj ni revidos vin en Montrealo – en 2022 !



**Bonan spektadon... kaj — ĉio iros bone !**

## La UK-silento en 2020

Dum la virtualaj kunvenoj de ESK ni lernas multon pri la homoj, kiujn ni ne vidas ofte. Multaj el ili ne loĝas proksime. Unu el tiuj fidelaj partoprenantoj estas Suzano Caron-Richer, el Otavo. Suzano estas artisto, kies aparta specialaĵo estas la antikva arto de anamorfozo (anamorphosis) — vi lernos pri ĝi en 2022, kiam ŝi prelegos pri tio dum la UK-2022. Ŝi ege ĝojis pri la kresko de partoprenantoj en decembro, kaj ŝi fariĝis ege trista pro la tutmonda epidemio, kiu sekvis en la venontaj monatoj. « Triste, la UK silentas en 2020 », ŝi skribis. Plej lastatempe Suzano kudras maskojn, multajn el kiuj ŝi ankaŭ donacas al aliaj.





# Monda Festivalo kaj Virtuala Kongreso-2020

*Gazetara Komunikado de UEA n-ro 875 (2020-05-21)*

UEA oficiale anoncas, ke okazos Monda Festivalo de Esperanto (MondaFest' 2020) kaj en ĝia kadro Virtuala Kongreso (VK).

MondaFest' 2020 okazos inter la 20-a de junio kaj la 20-a de septembro 2020, dum la VK okazos inter la 1-a kaj 8-a de aŭgusto 2020.

Tiucele UEA anoncas konkurson por krei emblemojn.

Se vi estas artema aŭ entuziasma pri la eventoj, sendu proponojn de emblemoj ĝis inkluzive la 14-a de junio al la Ĝenerala Sekretario de UEA Aleks Kadar per [alekska@gmail.com](mailto:alekska@gmail.com). La Estraro de UEA prijuĝos la proponojn kaj oficiale anoncos la gajninto(j)n de la konkurso la 20-an de junio dum la inaŭguro de MondaFest' 2020. Premio estos senpaga aliĝo al Universala Kongreso en 2021 aŭ

2022 kaj unu-jaran membrecon en UEA, se la gajninto(j) ne estas membro(j). La Estraro rajtas aljuĝi pliajn premiojn al aliaj escepte bonaj proponoj.



La programoj de MondaFest' 2020 kaj de la VK estos diskonigitaj en venontaj komunikoj. La plej ĝisdataj versioj de la programoj konstante konsulteblos per Eventa Servo. Se vi havas ideojn aŭ proponojn pri

eventoj, kiuj povos okazi, aŭ deziras, ke evento via okazu kadre de la festivalo aŭ de la kongreso, bv. kontakti la organizteamojn kiel indikite ĉe [eventaservo.org/e/mondafest2020](http://eventaservo.org/e/mondafest2020). Aprobataj eventoj kadre de MondaFest' 2020 povos anonciĝi uzante la emblemon kaj nomon de la festivalo, inkluzive en [EventaServo.org](http://EventaServo.org).

[uea.org/gk/875](http://uea.org/gk/875)

# Kial aliĝi al La Kanada Esperanto-Asocio (KEA) ?

*Bob Williamson, Sekretario de KEA*

« Kian valoron prezentas KEA al membroj ? » oni demandis al mi. Oni facile povas informiĝi pri KEA en ĝia [retejo](#), sed kial oni aliĝu ? Efektive, oni aliĝas al KEA kaj/aŭ ESK, same kiel al iu ajn asocio kiel UEA, por ĝin subteni. Oni ricevas la kontenton kontribui materiale al la disvastigo kaj instruado de Esperanto en Kanado, kio estas ĝia tuta celo. Kiel sugestis Ulrich Lins en la titolo de sia historieto de UEA, *Utila Estas Aliĝo* (2008).

La celon KEA realigas laŭ sia kapablo. Ĉiujare, KEA donas apogajn sumojn per stipendioj al esperantistoj (plejparte junuloj) por ĉeesti diversajn aranĝojn, kie ili povas bone ekzerci sin pri la lingvo, kiel ekz. Aŭtuna Renkontiĝo de Esperanto (ARE), Mez-Kanada-Renkontiĝo de

Esperanto (MeKaRo), Nord-Amerika Somera Kursaro de Esperanto (NASK), Norda Okcidenta Regiona Esperanta Konferenco (NOREK), Landa Kongreso kaj la Universala Kongreso (UK) en

Montrealo. KEA kontribuis por helpi al la Loka Kongresa Komitato (LKK) kaj, dum la nuna pandemio, KEA daŭre subtenas ĝin kaj planas daŭrigi la subtenadon de ĉeestaj kunvenoj, post kiam la pandemio ĉesos. KEA ankaŭ finance helpis al okazaĵoj kiel LangFest en Montrealo, kaj helpas organizi esperantlingvajn

versiojn de Paralela Universo, kie homoj uzas la lingvon en diversaj amuzaj manieroj.

KEA kunlaboris kun Espéranto-France por eldoni la libron La Eta Princo. KEA havas libroservon en



**Esperanto-tablo dum LangFest-jam de 3 jaroj ricevas subtenon DE KEA**

Otavo, kaj prizorgas ankaŭ la Libraron Ludovikan, nuntempe troveblan en Kalgario. Pasintjare pliboniĝis, dank' al Tiffany Antopolski, la trilingva retejo de [KEA](#), kie oni trovas ligilon al ĝia malferma paĝo en Facebook. Oni eĉ gratulis al ni pro la plibonigita pagsistemo pere de PayPal : « KEA modernigas ! » Kiel landa filio de UEA, KEA havas bonajn rilatojn ankaŭ kun aliaj landaj asocioj, precipe Esperanto-USA. Sed, kompreneble, multaj el la agadoj de KEA dependas de la libervola subtenado de ĝiaj membroj. Ju pli da homoj kunagadas, des pli bone KEA povas agi.

Oni certe rajtas atendi ion fizikan de sia landa asocio. Kutime KEA provizas membrojn per revuo (KAJ la oportuno kontribui al ĝi), sed provizore ĝi faras alie (per financa subteno). Ĉi-somere KEA intencas eldoni retpoŝtan version de aktuala Membrolisto, kiu ne aperis jam dum kelkaj jaroj. Tamen, pro lastatempa kresko de realiĝoj al KEA, ŝajnas ke oni ankoraŭ deziras partopreni la agadon. Ni dankas al vi.

Do, por parafrazi historiiston Ulrich Lins rilate al KEA : Konsilinda Estas Aliĝo.

Por aliĝi : <https://esperanto.ca/index.php/membreco/>

## Subtenu, subtenu, subtenu...

### *Ĵenja Amis*

Oni diras, ke ni staras sur la ŝultroj de gigantoj. Kaj tio estas tre taŭga esprimo por la Esperanto-Movado. KEA povas financi multajn iniciatojn, subteni la UK-on kaj diversajn projektojn (interalie, ĉiuj reklamaj eldonprojektoj de ESK), stipendioj por ĉiuj kanadanoj, multaj el kiuj estas el Kebekio. Estas ĉar niaj antaŭuloj donacis al la asocio kaj heredigis siajn havaĵojn. Sen tiuj niaj antaŭuloj ni ne povus fari multon el tio, kion ni faras nun.

Mi ŝatus peti vin konsideri subteni KEA-n — per donacoj kaj membriĝoj — kaj ni aparte petas vin konsideri kontribui cele al la UK en Montrealo en 2022. Vi povas fari tion per ĉiuj manieroj, inkluzive rete : [esperanto.ca/index.php/montrealo-2020](https://esperanto.ca/index.php/montrealo-2020).

Se vi ŝatus subteni specife la E-Movadon en Kebekio, konsideru donaci al Esperanto-Societo Kebekia (aŭ membriĝi, se vi loĝas en Kebekio kaj ankoraŭ ne membras), kiu estas inter la plej aktivaj organizoj en la mondo : [www.esperanto.qc.ca/eo/donacu/](http://www.esperanto.qc.ca/eo/donacu/). Laste sed ne balaste, UEA estas nun ankaŭ en la aparta bezono de donacoj. Vi povus donaci, interalie, al la fonduso « Partoprenu UK-on ». [uea.org/alighoj/donacoj](http://uea.org/alighoj/donacoj)

# Subtenu Esperanton en Kebekio !

*Nicolas Viau*

*Pourquoi devenir membre de la Société québécoise d'espéranto ? Pour appuyer son action et faire progresser l'espéranto ici et dans le monde.*

2020 ja estas jaro de eventoj... aŭ devis esti. La UK estis prokrastita de 2020 al 2022, sed dume Esperantujo daŭre vivos ĉi tie. Oni daŭre devos agadi – eĉ virtuale – kaj espereble igi la kongreson en 2022 eĉ pli sukcesa ol ĝi estus ĉi-jare !

Kiel apogi la strebojn disvastigi konojn pri nia lingvo ĉi tie en Kebekio ? Simplas: fariĝu membro de ESK, se vi ankoraŭ ne faris ! Sed kial fariĝi membro de asocio hodiaŭ, kiam ĉiuj resursoj alireblas tre facile, kaj ofte senpage tra la reto ?

Nu, ĉu rete aŭ ĉu ĉeeste, daŭre gravas agadi.

Asocioj kiel ESK ĉie en la mondo helpas (kaj daŭre helpas – kiam eblos !) organizi kaj starigi kunvenojn (virtualajn kaj ĉeestajn – tiuj du maniero kunveni ne kontraŭas, sed kompletigas unu la alian) ! Pensu pri la tre agrablaj MEKARO-j,

organizitaj kun samideanoj en Ontario, kiuj estas unuj el la ĉefaj kunvenoj de orienta Kanado, danke al kiuj oni povas malkovri multajn novajn lokojn. Sed ankaŭ pensu pri ARE, kiu jam de jaroj estas ebligas Esperantistojn el tiu ĉi parto de Nordameriko kunveni en malstreĉiga etoso. Kaj ni ne forgesu niajn



proprajn regulajn kunvenojn en Montrealo kaj Kebeko, esencajn por multaj lokaj parolantoj – kaj danke al kiuj formiĝis gravaj amikaroj.

Ofte ankaŭ asocioj, pere de sociaj retoj, pere de starigo de informbudoj, pere de kontaktoj kun ĵurnalistoj, helpas ankaŭ sciigi la ceteran mondon pri Esperanto. Tion

ESK provas fari, provante aliri ĉiujn modernajn komunikmanierojn.

ESK ankaŭ subtenas eldonadon de Esperantaj libroj en Kebekio – kaj de originalaj verkoj kaj de tradukoj de Kebekiaj verkoj. Ni menciuj ekzemple la libron *Kistnaskaj*

*Rakontoj*, tradukita de Francisko Lorrain. Baldaŭ venos fakte novaj verkoj, kiuj certe plaĉos al la Esperantistaro Kebekie kaj tutmonde !

Plie, ESK strebas konservi la memoron de la Kebekia movado per ciferigo de arkivoj. Ekzemple, en la retejo de ESK, haveblas de jam pli ol du jaroj

ciferigitaj ekzempleroj de *L'Alvoko*, organo de Kebeka Esperanto-Klubo komence de la 60-aj jaroj, el la personaj arkivoj de S-ro Jacques Gaucher. Baldaŭ aperos pliaj dokumentoj freŝdate trovitaj, interalie unuafoje viditaj arkivoj de la Juda Publika Biblioteko de Montrealo.



ESK ankaŭ apogas la projektojn de siaj membroj. Ni pensu pri la nova Esperanto-domo en Tririvero, danke al iniciato de Suzano Roy – post kelkaj jaroj sen Esperanto-domo en Kebekio.

Kotizo de 25 dolaroj donas dumvivan

membrecon. Kaj se vi kapablas fari pli, pripensu fari donacon kaj ankaŭ aliĝi kaj al la Kanada Esperanto-Asocio kaj al Universala Esperanto-Asocio, tiel ke la movado fortiĝu ĉe diversaj agadniveletoj – apogo estas bezonata dum tiu ĉi malfacila epoko.



## La Libraro Ludovika serĉas novan hejmon

*Geoffrey Greatrex*

**La libraro, kiun malavare testamentis al la kanada esperantistaro D-ro Steĉjo Norvell, serĉas novan sidejon.**

Dum la lastaj jaroj gastigis ĝin Allan Simon en Kalgario, sed nun li deziras, ke iu alia transprenu ĉi tiun respondecon. Temas pri kolekto de proksimume 1800 libroj en Esperanto, do tiu, kiu akceptos gastigi ilin, nepre devas havi spacon por pluraj bretaroj ! La principo de la libraro estas, ke oni sendos libron al ano de KEA, kiu ĝin petas – kiu devas poste, evidente, ĝin resendi.

Steĉjo afable ankaŭ postlasis rimedojn por helpi pri la prizorgado de la kolekto, kiel ankaŭ por helpi pri sendado de libroj. Oni trovos pliajn

detalojn pri la kolekto kaj tutan katalogon ĉi tie : <http://www.genekeyes.com/Enkonduko.html>

Oni ŝuldas ankaŭ al Gene Keyes dankon pro lia laboro pri la katalogo. Estus preferinde, ke oni konservu la librojn ie en la okcidento de la lando, ĉar jam troviĝas bona kolekto en Kebekio.

Se vi interesiĝas pri gastigado de la libroj, bonvolu kontakti Bob Williamson, sekretario de KEA : [<informo@esperanto.ca>](mailto:informo@esperanto.ca)

# Virtualaj kunvenoj en Kanado

*Bob Williamson, Dartmouth, Nov-Skotio*

« En la mondon venis nova sento » de du-metra distanco-neceso. Pro la koronavirusa malsano KOVIM-19, ni ĉiuj devis ĉesigi niajn grupkunvenojn en la kutimaj lokoj, ĉu kafejo aŭ restoracio, ĉu biblioteko aŭ loĝejo de grupano. Sed esperantistoj ĉirkaŭ la mondo rapide ekuzis siajn komputilojn kaj telefonojn por starigi kaj ĉeesti virtualajn kunvenojn per la interreto. Ankaŭ en Kanado.

Efektive, virtualaj kunvenoj donas avantaĝojn. Unue, oni ja rajtas kunveni dum ĉi tiu pandemio ! Oni rajtas komforte resti hejme sen la neceso batali la veteron kaj trafikon por veturi al kunvenloko. Oni kapablas vidi ne nur la kutimajn vizaĝojn, sed ankaŭ la aliajn el via regiono, kiuj loĝas tro malproksime. Oni kapablas vidi eĉ vojaĝantajn

grupanojn kaj eksterlandanojn el la tuta mondo. Ekzemple, halifaksanoj kiel mi povas facile paroli kun amikoj trans la provinco de Nov-Skotio, de Berviko tra Antigonish ĝis Northport. Nia fidela halifaksa grupano, nuntempe en Ĉinio, ankaŭ

partoprenas, same kiel nia halifaks-devena amikino en Kolombio. Venas ankaŭ eksterlandanoj de tempo al tempo, ĉu de Brazilo, Hispanio, Irano, Francio, Germanio kaj Usono. Ili venas, ĉar Andy Blair donis informon pri niaj kunvenoj en

[EventaServo.org](http://EventaServo.org). Oni

renkontas diversajn interesajn kaj amikemajn homojn. Laŭ nia opinio, tiaj kunvenoj taŭgos eĉ longe post la pandemio.

Ankoraŭ estas malavantaĝo. Depende de la reta kunvenilo kaj la propra konekto-kapablo, la



**Reta kunveno de ESK en aprilo 2020**

sonkvalito kaj vidkvalito ne ĉiam bonegas, kaj oni devas trankvile kaj ĝentile atenti pri tio, ke homoj ne parolu samtempe. Krom tio, la teknikajoj multe helpas por konekti nin ĉiujn al niaj samideanaj geamikoj.

Do, kio okazas nuntempe en Kanado, kaj kiel mi kaj vi povus renkontiĝi ? En la retejo de la [Kanada Esperanto-Asocio](#) troveblas la nomoj de 15 Lokaj

Kluboj, la plejparto kun ligiloj al retpaĝoj de Meetup aŭ lokaj aferoj. Traserĉante, oni povas konstati, ke troveblas kelkaj retkunveneblecoj : Halifaxo, Kebeko kune kun Montrealo, Otavo, kaj Londono. Dank' al Andy, la halifaksa estis verŝajne la unua grupo, kiu ekkunvenis en Kanado pere de tre facile uzebla apo, « Jitsi Meet ». La kebekia kunveno uzis la saman kunvenilon. La otava grupo komencis per Skajpo, kaj esploras manieron konektiĝi sen la neceso havi skajpan konton.

En la fora okcidento, Wally du Temple gastigas virtualan kunvenon pere de la furora sistemo « Zoom » ĉiun sabaton je la 10-a horo matene (Pacifika tempo). Li nomas la kunvenon NOREK

KUNVENAS VIRTUALE. NOREK estas akronimo por Norda Okcidenta Regiona Esperanta Konferenco, kies unua kongreseto okazis en 1981 kaj alternis inter Kanado kaj Usono kutime ĉiujare. La venonta ĉeesta kunveno estas planota por Seatlo en septembro 2020. Kiuj ajn rajtas partopreni, eĉ se vi ne loĝas en la biosfera regiono de Kaskadio, kies riveroj elfluas en la Pacifikon. Simple sendu vian


peton al Wally du Temple, ke vi deziras ricevi invitilon por tiuj virtualaj kunvenoj. Lia

adreso estas

[wallydutemple@telus.net](mailto:wallydutemple@telus.net).

Ĝis nun, kanadaj grupoj en aliaj lokoj kiel Kalgario ne anoncis la intencon kunordigi virtualajn kunvenojn, sed la situacio rapide evoluis. Oni eĉ pensas pri virtuala babilejo

por kanadanoj. Ĉu vi ŝatas tiun ideon ? Oni devus pripensi diversajn aferojn, ekzemple sekurecon, stabilecon, eblan limigon de la nombroj da samtempaj partoprenantoj, taŭgajn kunvenhorojn, ktp, ktp. Kion vi opinias ? Ĉu vi havas bonajn ideojn pri kiel realigi tion ? Skribu al mi. Ĝis baldaŭ en reta kunveno amike salutas Bob Williamson. <informo@esperanto.ca>





# Esperanto-kursaroj : virtuale kaj tutmonde !

Multaj Esperanto-eventoj alprenis virtualan formaton – ne estas escepto ankaŭ Esperanto-kursaroj. Notu, ke du el la plej gravaj Esperanto-kursaroj proponas plenan programon virtuale. Se vi ĉiam volis sperti unu el tiuj eventoj, sed ne povis trovi la okazon, jen perfekta maniero tion fari ne eĉ elirante de via domo ! Ni invitas vin ankaŭ diskonigi tiujn ĉi informojn inter viaj amikoj, kiuj povus interesiĝi pri virtuala Esperanto-kurso !

## NASK virtuale

Virtuala NASK (Nord-Amerika Somera Kursaro) okazos per la programo Zoom, inter la 29-a de junio kaj la 3-a de julio, kaj ankaŭ inter la 6-a kaj la 10-a de julio 2020, 19:30 – 21:00, orienta horzono (Montrealo, Toronto, Novjorko). Estos tri niveloj, kaj la nombro de partoprenantoj estas limigita, do, ne forgesu registri vin por la kurso rapide.

### Postbaza Kurso : Hans Becklin (ĝis 25 partoprenantoj)

Postbaza kurso estas por ĉiu lernanto de Esperanto, kiu jam finis bazan kurson, ekzemple, de Duolingo aŭ Lernu.net. La postbaza kurso helpas al vi « salti en Esperanton » : komenci uzi

la lingvon pli memstare, kaj por viaj propraj celoj en lingvolernado. En la kurso de Hanso vi atingos multe pli altan nivelon de Esperanto per pli profunda komprenado de ĝia gramatiko kaj novaj kaj pli profundaj spertoj en legado, parolado kaj aŭskultado. Bonŝance, la energiplena instrumetodo de Hanso helpas al vi progresi sen enuo – li uzos multajn rakontojn, kantojn, ludojn kaj ekzercojn por instrui la lingvon kaj doni al vi veran sperton de la bunta Esperanto-komunumo.

### Meznivela Kurso : Thomas Alexander (ĝis 25 partoprenantoj)

En la meznivela kurso vi havos la okazon pliprofundigi vian kapablon pri Esperanto. Pere de parolaj kaj skribaj taskoj, vi akiros kaj novajn sciojn, kaj memfidon. La kurso konsistos el



grandaj kaj malgrandaj grupoj, kaj aldonaj eksterlecionaj ekzercoj. Partoprenantoj devus jam posedi ĝeneralan komprenon pri Esperanta gramatiko, sed ni atentis kelkajn pli malfacilajn aŭ ofte miskomprenitajn flankojn – kaj ni, kompreneble, traktos demandojn, kiam ili aperos en la grupo. Krom tio, ni studos kelkajn gravajn erojn de Esperanto-literaturo, kiujn ĉiu « klera Esperantisto » devus koni, kaj ni donos atenton al komunikadaj kapabloj en oftaj situacioj, kie oni parolas Esperanton.

### **Supera Kurso : Prof. Duncan Charters (ĝis 50 partoprenantoj)**

En la supera kurso ni studos la evoluon de Esperanto kiel lingva kaj socia fenomeno. Kial kaj kiel D-ro Zamenhof alvenis al la ideo kaj formo de

Esperanto ? Kiaj problemoj frontis la evoluantan lingvon kaj movadon ? Kion celis reformprojektoj kaj kiel okazis la « Ido-krizo » ? Kial de la komenco ekzistis ĉiam ideologiaj tensioj ĉirkaŭ la lingvo, ĝia uzado, kaj ĝiaj celoj ? Kiel rolis literaturo en la historio de la lingvo ? Kiel statusas Esperanto nun ? La kurso ne estos nur prelegstila, ĉar en ĉiu klaso grupetoj respondos al kernaj demandoj kaj debatpunktoj prezentitaj de la instruisto por posta raportado al la klaso.

Oni devas registri sin ĝis lundo, 22-a de junio 2020 (plena kotizo : 75 USD, aŭ 37.5 USD se vi ricevis stipendion). Ĉiuj informoj (registrilo, kiel pagi) troviĝas ĉi tie : [esperantic.org/eo/nask-2020-2/](https://esperantic.org/eo/nask-2020-2/)

### **SES kaj SEP rete !**

La pandemiaj obstakloj ne permesas, ke **SES 2020** (SES : Somera Esperanto-Studado) okazu fizike en Ĉeĥio, kiel antaŭe planite. La ĉi-jara, virtuala SES okazos inter la 18-a kaj la 26-a de julio 2020, kaj la ĉefa instruado okazos dum la du semajnfinoj (kun aldona libervola programo inter ili, ĉefe posttagmeze/vespere laŭ la mezeŭropa tempozono).

Dum SES okazos ne nur diversnivelaj kursoj de Esperanto, sed ankaŭ kurso pri Esperanto-

literaturo kaj kulturo kaj plia kurso pri tradukado de kaj al Esperanto. La kursojn gvidos spertaj instruistoj. Pliaj detaloj : [ses.ikso.net/2020/eo/instruado/](https://ses.ikso.net/2020/eo/instruado/) Kurson pri la Esperanto-literaturo gvidos sperta instruisto Oleg (Oĉjo) Ĉajka el Rusio, la kurson pri tradukado gvidos fama verkisto/tradukisto/bardo : Mikaelo Bronŝtejn. Krom tio, la partoprenantojn atendas diversaj prelegoj, diskutoj, kvizoj, koncertoj kaj multe pli.

Aliĝu al la unua virtuala tutmonda SES ĉi tie : [ses.ikso.net/2020/eo/aligxilo/](https://ses.ikso.net/2020/eo/aligxilo/) Nuntempe E@I diligente laboras pri la detaloj tiu ĉi pure reta SES : pri ties formo, enhavo kaj la retpaĝo.

Pliaj informoj aperos baldaŭ en la retpaĝo de SES kaj same en la vizaĝlibra paĝo : [mallonge.net/SES2020](https://mallonge.net/SES2020). La organizantoj esperas, ke vi ĝuos ilian aranĝon kaj malgraŭ la pandemio ne mankos al vi la etoso de Esperantaj renkontiĝoj ĉi-somere. Ili promesas fari ĉion, por ke la virtuala SES estu sukcesa !



Notu, ke krom SES okazos ankaŭ ĉi-jare aldona, paralela evento, organizita de E@I-teamo : **SEP** (Somera Esperanto-Programado). Samkiel SES, ankaŭ SEP estis ŝovita al la virtuala spaco ĉi-jare. Tio povas ankaŭ helpi al multaj kunfari, partopreni de siaj hejmoj – ĉar ja la ideo de SEP estas kunlabore realigi poresperantajn interretajn

projektojn. Do, por tiu ĉi evento la reta platformo estas eĉ utila kaj bonvena !

La aranĝo celas esti Esperanta kodum-maratono – kaj tiu ĉi evento estos eĉ senpaga ! Se vi

do konas iujn, kiuj ŝatus kunrealigi projekton, utilan por Esperantujo dum Somera Esperanto-Programado, nepre informu ilin !

Gvidantoj de SEP : Kryštof Klestil (Ĉeĥio) kaj Yves Nevelsteen (Belgio). Detaloj : [sep.ikso.net](https://sep.ikso.net)

# Por Kolombina

*Albert Giraud (trad. : Stéphane Brault)*


Albert Giraud (1860-1929) estis franclingva verkisto el Belgio. Li aŭtoris plurajn poemojn, inklusive de sia famkonata *Pierrot lunaire* (1884), 50 simbolismaj rondeloj pri Pieroto, la rolulo de la *commedia dell'Arte*, kies nura amiko estas la luno. Kelkajn jarojn poste, Arnold Schoenberg muzikigis 21 el ili por sia netonala verko samtitolita (1912). Mi interesiĝis pri kelkaj el tiuj poemoj, kiujn mi provis esperantigi — Stéphane Brault.

Pala floro de plenluno  
Kiel rozo lakteblanka,  
Malhelido somernokta,  
Nur teni vin en la mano!

Kvietig' de l'misfortuno:  
Laŭ Lete' serĉad' senfina  
De l'pala flor' de plenluno  
Kiel rozo lakteblanka.

Silentiĝos la rankoro  
Nur se de l'ĉiel' kolera  
Venas volupto ĥimera:  
Bruna felo, petalpluvo,  
Kaj pala flor' de plenluno.

*Traduko: Stéphane Brault.*



**Pierrot Lunaire**

*Three times seven poems  
by Albert Giraud*

**ARNOLD  
SCHOENBERG**

Alice Howland, SPECHSTIMME  
Gilbert Kalish, PIANO  
Louise Burge, FLUTE & PICCOLO  
Chester Milosovich, CLARINET, BASS CLARINET  
Abram Loft, VIOLIN & VIOLA  
George Sopkin, CELLO  
Herbert Zipper, CONDUCTOR

**STRAVINSKY**

DUMBARTON OAKS  
(CONCERTO IN E FLAT MAJOR  
FOR CHAMBER ORCHESTRA)

HARRY NEWSTONE  
CONDUCTING  
THE HAYDN ORCHESTRA

SAGA

# Unua esperantlingva meso en Kanado

La redakcio ricevis kun plezuro mesaĝon de Onil Perrier (92-jara, Saint-Denis-sur-Richelieu), reage al la 2-a numero de *La Riverego* ĉi-jare ([numero 139-140](#)). Onil estis feliĉa vidi, ke ni memoris la fondinton de la Esperanto-Movado en Kebekio, abato Solys, kaj ke oni menciis la kanadan kongreson, la 1-an de julio 1967, kie li mem kuncelebris, kun frato Durette. Mi ĝojas, ke la unua esperanta meso, eble, okazis ĉe ni, en Montrealo ! Dankon, Onil, pro tiu gravega informo !

## *Onil Perrier*

La unuan de julio de 1967, Esperantistoj el tuta Kanado kunvenis en Montrealo por sia jara kongreso, en la Centre Montfortain, je la strato Sherbrooke. Ili nombris ĉirkaŭ cent. Tiutempe, mi estis ano de la teamo de pastroj, kiu animis la centron. La antaŭan jaron, t.e. 1966, mi estis aliĝinta al la Movado.

Inter la aktivaj membroj estis religiulo loĝanta en Repentigny, apud Montrealo : frato Pierre Durette. Tiu eksciis, ke



Vatikano aprobis, en majo de 1967, dokumenton por celebri meson en Esperanto. Li estis alportinta la broŝurojn el Eŭropo kaj, kiam li konstatis, ke mi pretis uzi ilin, li verkis predikon, kiun mi legis al la

grupo. Ni ankaŭ kantis himojn, kiel Gloria kaj Sanctus, en Esperanto, laŭ la melodio de la Meso de l' Anĝeloj : « Gloro al Dio en ĉielo ».

Tiu meso verŝajne estis la unua celebrite en la mondo en la universala lingvo. Tio konsistigas forajn kaj belajn memorojn.

*Français:*

## *Une première messe en espéranto au Canada*

Le 1<sup>er</sup> juillet 1967, les espérantistes de tout le Canada s'étaient donné rendez-vous à Montréal pour leur congrès annuel, au Centre Montfortain, sur la rue Sherbrooke. Ils étaient environ une centaine. À l'époque, je faisais partie de l'équipe des prêtres qui animaient ce centre. L'année d'avant, soit en 1966, j'étais devenu membre du Mouvement.

Parmi les membres actifs, il y avait un religieux demeurant à Repentigny, le frère Pierre Durette. Celui-ci avait appris que le Vatican avait approuvé, en mai 1967, un formulaire pour célébrer la messe en espéranto. Il avait fait venir ces brochures d'Europe et, quand il a vu que j'étais prêt à les utiliser, il a préparé une homélie que j'ai lue au groupe. Nous avons aussi chanté des hymnes tels que le Gloria et le Sanctus, en espéranto, sur l'air de la Messe des Anges : « Gloro al Dio en ĉielo ».

Cette messe a probablement été la première au monde célébrée dans la langue universelle. Ce sont de lointains et beaux souvenirs.

**La LKK-teamo por Montrealo aperis sur la kovrilpaĝo de Revuo *Esperanto* ! (mankas nur Garry Evans, kiu ne partoprenis la UK-on en Lahtio). [uea.org/revuoj](http://uea.org/revuoj)**



# La hundoj regis Marketon

*Sheila Devlin*

Dum la semajfino de la 14–16-a de februaro 2020, hundoj regis la urbon de Marketo (Marquette), Miŝigano, ĉar tiam okazis la hundsleda konkurso « UP 200 » (Upper Peninsula 200, t.e. Supra Duoninsulo 200). Dek ok konkursanoj partoprenis, ĉiu kun siaj dek aŭ dek du hundoj. Iu sledgvidistino venis el Nova Brunsviko, nome Katherine Langlais de Glenwood. Kvin aliaj venis el Kebekio : André Longchamps kaj Tristan Longchamps de Pont-Rouge, Martin Massicotte de Saint-Tite, Denis Tremblay de Saint-Michel-des-Saints, kaj Carl Routhier de Rouyn-Noranda.

Tiuj ses « maŝer »-oj (el la angla vorto « musher », el « mush », misprononco de la franca vorto « marche », t.e. marŝado) kaj aparte iliaj heroaj hundoj, kiuj kuris la 230 mejlojn, donis al Marketo ekvidon de la nuntempa sporto de hundsled-konkursado. Ĝi historie devenis el la ĉiutaga vivo



de indiĝenoj kaj Inuitoj en norda Kanado. La koloniantoj rekonis la avantaĝon de hundsledo kaj la franc-kanada milicio uzis hundteamojn kiel helpantojn. La hundteamoj estis malpli kostaj ol ĉevaloj, sed egale ekipitaj (kaj ofte pli) por tiri pezajn ŝarĝojn en glaciaj temperaturoj.

Hodiaŭ ni havas la faman konkurson « Iditarod » en Alasko, Usono. Tiu konkurso daŭris tri semajnojn en 1973, ĉar la hundoj devis kuri 938 mejlojn tra la sovaĝejo. Pri tiu konkurso, Martin Massicotte diris : « De kiam mi estis deksesjara, mi revis

konkursi en la Iditarod, kaj ĉi tiun jaron [2020], tridek kvin jarojn poste, mi realigos mian revon. » La defio baldaŭ okazos.

Rémy Leduc, mem maŝer kaj edzo de konkursistino Katherine Langlais, informis min, ke dum la nevintraj monatoj, maŝer-oj havas



Elyse Lessard kun Marketa gastiganto.

diversajn postenojn, ekzemple, en konstruado, ŝosea laboro, gardado ktp. Rémy laboras kiel helikoptera piloto por Helicopter Transport Services (Kanado), kaj liaj laborlokoj estas en Nunavut. Li kaj Katherine posedas tridek du hundojn.

Por Elyse Lessard kaj maŝer Carl Routhier el la urbo Rouyn-Noranda, la hundzorgado estas plentempa okupo. Krom iliaj sesdek sledhundoj, ili zorgas pri hundoj de aliaj homoj. La hundeja komerco dum la somero estas vigla. La hejmo de Elyse kaj Carl kaj iliaj du infanoj havas grandan hektaraĵon por la domo, la sledhundoj, kaj ilia

komerca hundejo « Chenil d'Aiguebelle ». Ĝi estas bone situata apud registara ejo, kie la sledhundoj povas kuri libere en grupoj po dudek samtempe.

Pri la sporto de hundsled-konkursado Elyse diras kaj konsilas : « Estas vivstilo. Ami la hundojn antaŭ la sporto ! »

Estis ĝoja evento vidi la francparolantajn maŝerojn ĉi tiun jaron en Marketo.

## Tertremo difektis la Zagreban klubojn

Unu persono mortis kaj 27 estis vunditaj en la tertremo kiu trafis la ĉefurbon de Kroatio la 22-an de marto. Ŝajne neniuj esperantistoj estis rekte trafitaj, sed difektiĝis la sidejo de la loka Esperanto-klubo, kiu nun bezonas kostajn riparojn. Pli da informoj en [Libera Folio](#). Spomenka Štimec : « Dum la matena tertremo la 22an de marto ĉiuj loĝantoj elkuris surstraten en malvarman matenon en noktoĉemizoj kaj kovriloj kaj kun la piedoj sur la tero forgesis por momento korona-viruson. Mi havis nian maskon survizaĝe, mi havis gantojn. Post la unuaj tertremoj... ĝis hodiaŭ atakis nin 90 tertremoj malpli fortaj. Se iu demandas onin : Kiel vi fartas ? La respondo estas : Mi fartas 5,50 laŭ Richter. »



# Kolektanto de ĉielarkoj

*Tibor Sekelj (Pisa, Edistudio, 1992)*

La atmosfero en la triaklasa kupeo estis sufoka. Ŝvitodoro ŝvebis en la aero. Kun malŝato mi pensis pri la multaj horoj de vojaĝo, kiuj ankoraŭ staris antaŭ mi.

Miaj kunvojaĝantoj vigle babilis pri temoj, kiuj eĉ ne por momento povis fiksi mian atenton.

Vidalvide de mi, de la kontraŭa flanko de la fenestro, sidis dekjara nigrokula knabino. Sur ŝia vizaĝo ŝajnis al mi diveni la saman enuon, kiun mi mem sentis.

Mi decidis alparoli ŝin.

Responde al miaj demandoj Sita rakontis, ke ŝi lernas en la kvara klaso de elementa lernejo. Ŝi ŝatas la geografion kaj malŝatas la matematikon. Post kelkaj pluaj demandoj la konversacia

materialo estis elĉerpita. Paŭzo ekestis.


Mi ekmemoris pri kelkaj leteroj kun diverslandaj poŝtmarkoj, kiujn mi havis en la poŝto, kaj pensis, ke per ili mi povus ĝojigi la knabinon.

« Ĉu vi kolektas ion, Sita ? »

« Kolekti ?... Ne, nenion mi kolektas, » ŝi respondis.

Silento. Mi ekserĉis alian temon por vivteni la konversacion. « Kaj ĉu vi kolektas ion, sinjoro ? Kion vi kolektas ? » La fronta atako de Sita frapis min neatendite.

Mi ja estis veterana kolektanto de ĉio imagebla. Por ne kompliki la aferon, mi volis diri ion simplan, kiel poŝtmarkojn aŭ bildkartojn. Tamen post momento tio ŝajnis al mi neinda banalaĵo. Dum tempero mi pretis konfesi al ŝi la sekreton de mia vivo : mi kolektas



aventurojn ! Sed tio ŝajnis tro abstrakta. Ŝi certe ne kapablu kompreni min.

Dum kelkaj sekundoj mi rigardis tra la fenestro meditante. Ĉar ni sidis en la unua vagono de la trajno, mi klare povis vidi tra la fenestro la vaportufon elŝprucatan el sub la lokomotivo. La sunradio rompiĝadis tra la vaporo kaj formis duonrondan zonon de ĉielarko ĉirkaŭ ĝi.

« Ĉielarko ! » mi ekkriis kun admiro.

« Kion ?... Ĉu ĉielarkojn vi kolektas ? » demandis mia inkvizitoro kun la okuloj larĝe malfermitaj.

« Kion ?... Jes, kompreneble, hm, ĉielarkojn. Ĉu io stranga pri tio ? »

Sita ne sciis ĉu kredi al mi aŭ ne. Subokule ŝi ekzamenadis mian vizaĝon por malkovri sur ĝi ŝercan rideton. Sed ŝerca rideto tie malestis. « Kaj kiel vi kolektas ilin ? » ŝi kuraĝis finfine demandi.

La radoj de la vagono per monotona frapado akcentadis la sufokan atmosferon de la kupeo. La ĉielarko ĉirkaŭ la vaportufo vetkuradis kun la lokomotivo antaŭ miaj okuloj.

« Kiel mi kolektas ilin ? Simple. Kie ajn mi vidas unu, mi enmetas ĝin en mian kolekton... Kompreneble, nur se mi ne havas ankoraŭ similan ekzempleron. »

La nigraj okuloj de Sita fikse rigardis min. Ili atendis. Ili atendis iun gravan malkovron.

« Ĉar ĉielarkoj povas esti, vi ja scias, tre diversspecaj... »

« La unua, kiu eniris mian kolekton, estis tre kutima ĉielarko. Mi vidis ĝin, kiam mi estis apenaŭ kvinjara. Mi subite ĉesigis la ludadon kun mia pli aĝa frato kaj aliaj vilaĝaj knaboj. Senspire mi gapis al la bunta miraklo. Ĝi ŝajnis tiel proksima ! »

« Mia frato, vidinte mian admiron, diris: 'Tiu, kiu sukcesas pasi sub la ĉielarko, ĉiam en la vivo sukcesos plenumi sian deziron !' Li ŝajnis paroli serioze. Mi eĉ momenton ne dubis pri la vereco de lia aserto. »

« Senvorte, kvazaŭ hipnotita, mi ekmarŝis en la direkto de la mirinda pordego. Mi rapidis tra la vilaĝa strato ne deprenante la rigardon de la ĉielo, kaj alveninte al la rando de la vilaĝo mi daŭrigis la marŝadon tra la vasta paŝtejo. Ŝajnis al mi, ke mi rapide alproksimiĝas al la arko de ĉiuj sukcesoj. »

« Kaj ĉu vi sukcesis ? Ĉu vi pasis sub ĝi ? » senpaciencis Sita.

« Ne. La suno malleviĝadis pli kaj pli, kaj la ĉielarko paliĝis ĝis fina malapero. Nur mi restis sola kun mia senlima admiro, gapanta al la ĉielo.

« La vidaĵo de tiu ĉielarko restis tiel profunde gravurita en mia menso, ke mi senhezite povas diri, ke ĝi restis mia propraĵo. Tiu estis mia unua sperto pri la posedo de ĉielarko. Posedo, cetere, kiun neniu povas de mi forpreni, okazu kio okazos. »

« Poste sekvis aliaj. Unu post la alia ili fariĝis miaj, kreante mian kolekton. »

Sita sidis senmova aŭskultante min. Ŝia patro proponis al ŝi oranĝon, sed ŝi malakceptis. Ŝi estis tro okupita per la rakonto.

« Kaj ĉu vi havas multajn ĉielarkojn, sinjoro ? Kiaj ili estas ? »

« Hm, jes. Ne estas multaj en mia kolekto, ĉar... mi ja ne prenis ĉiun ajn ĉielarkon. La kutimajn mi lasas por aliaj, kaj prenas nur la eksterordinarajn. Ekzemple... »

Dum momento mi intense serĉadis en la arĥivo de mia memoro iun elstaran ekzempleron el mia kolekto. Fine jen ĝi estis.

« Mi troviĝis en antikva marborda urbeto de mia lando. Post pluva mateno subite disiĝis la nuboj kaj, eĉ antaŭ ol mi ekvidis la sunon, ĉielarkoj aperis sur la ĉielo. Mi diris 'ĉielarkoj', ĉar ne estis unu, sed du. Unu super la alia. La pli malgranda

estis klara, kun koloroj tre intensaj. Unu el ĝiaj flankoj ripozis sur la antikvaj tegmentoj de la domaro, dum la alia dronis en la maron. Ĝi aspektis kvazaŭ simbolo esprimanta la ligan inter la urbo kaj la maro. Kaj la ĉielarko pravis. Dum multaj jarcentoj la loĝantoj de la urbo estis navigistoj, fiŝkaptistoj, piratoj, markomercistoj kaj maristoj sur ĉiuspecaj ŝipoj. »

« Super tiu ĉi bildo, kvazaŭ formante kadron al ĝi, etendiĝis la dua ĉielarko. Iomete pli pala ol la suba. »

« Kaj nun, Sita, se vi promesas ne rakonti ĝin al aliaj, mi diros al vi sekreton. »

« Mi promesas, » flustris la knabino.

Mi ĉirkaŭrigardis por certigi ke neniu aŭskultas nin. Tiam mi alproksimiĝis al la knabino.

« Imagu » mi diris, « la koloroj de la supra ĉielarko estis renversitaj. Ĉiu bona kolektisto scias, ke la violkolora kaj la blua estas la supraj koloroj, kaj la ruĝa kaj indiga troviĝas malsupre. Kaj tiel ili troviĝis en la malsupra ĉielarko. Sed en la supra la ordo estis renversita, kvazaŭ ĝi nur respegulus la alian. »

Sita rigardis min konsternite. Sur ŝia vizaĝo estis videble ke ŝi estis konscia pri la graveco de la

sekreto.

« Kaj poste... ? »

« Poste... Mi fotografis per kolora filmo la duoblan ĉielarkon, kaj se iu ne kredas, mi montras la foton. Aŭ mi diras 'demandu Nina. Ŝi estis tie kaj ŝi povas konfirmi mian aserton'. »

« Sed mi prezentos al vi alian ekzempleron de mia kolekto, » mi reprenis la rakonton, jam kuraĝigita per la granda intereso, kiun la brunhaŭta amikino montris por mia kolekto.

« Okazis tio en alta montaro. Kune kun kelkaj amikoj mi troviĝis en tendaro, en valetio inter neĝaj pintoj. Pro la alteco ni ĉiuj sentis iom da sufokiĝo, kiu ne permesis al ni dormi. »

« Post longa sendorma horo mi decidis eliri el la tendo. Ekstere mi trovis mian amikon Georgon, sidantan sur ŝtono. Fumante li observis la naturon. »

« Estis plenluna nokto. La luno kvazaŭ grandega lanterno pendis super la proksima glaciejo, banante la rokecan pejzaĝon per blua mistera lumo. La ĉielo surhavis milojn da steloj. Ĉiuj brilegis tiel grandaj, kiajn mi ankoraŭ neniam vidis ilin. La altaĵa aero estis pura pro la maldenseco kaj sekeco. La videblo estis senfina. »

« Subite du flamoj aperis sur ambaŭ flankoj de la luno, apogante sin sur montojn ĉirkaŭ la glaciejo. 'Kia stranga afero !' diris Georgo, homo kun longa sperto montgrimpa. »

« Antaŭ niaj surprizitaj okuloj la du flamoj komencis leviĝadi transformiĝante en du kolonojn. Nun ili kurbiĝadis. Iom post iom ili formis arkon ĉirkaŭ la luno. Kaj fine la arko koloriĝis je ĉiuj koloroj de la ĉielarko. »

« La spektaklo estis eksterordinare bela. Ni staris tie kun la spiro retenita, kaj ĝuis intense. »

« Poste mi eksciis ke nur malmultaj homoj en la mondo ekzistas kiuj vidis similan fenomenon. Kaj kompreneble, mi estas tre fiera havi en mia kolekto tian maloftaĵon. »

Eta Sita senspire min aŭskultis. Ŝi glutis ĉiun mian vorton.

« Rakontu ankoraŭ, sinjoro, » ŝi diris kun peta voĉo, kiam mi ekpaŭzis. Kaj mi daŭrigis.

« Sed en mia kolekto troviĝas ne nur maloftaĵoj, sed eĉ veraj altvaloraj ekzempleroj. Mi prezentos al vi la plej altvaloran el ĉiuj miaj ĉielarkoj. La plej multekostan, por tiel diri. »

« En iu malproksima lando mi vizitis foje la iaman imperiestran palacon, kiu nun estas transformita

en muzeon. Ĉiuj salonoj estis malfermitaj. Nur unu ĉambreton, en kiu la krono de la imperiestro estis gardata, oni malfermis nur je speciala peto de la vizitantoj. Post la necesaj formalajoj la gardisto malŝlosis la pordon, kaj mi eniris. Nun ni staris en malgranda ĉambro, malplena kaj sen ornamaĵoj. 'Kio okazos ?' ni demandis nin. Sed la respondo jam venis. »

« El la planko, meze de la ĉambro, ekleviĝis kvarangula kolono. Kiam ĝi leviĝis ĝis la alteco de niaj brustoj, subite la metalaj vandoj de la kofro sur la supro de la kolono malfermiĝis lasante libera vitran skatolon. Kaj en ĝi la krono. »

« Jes, vere, tie estis antaŭ niaj okuloj la ora kronego de la imperiestro, plena de brilaj juveloj. La plej belaj rubenoj kaj safiroj viciĝis tie unu apud la alia. Kaj pluraj perloj je grandeco neniam vidita. »

« Kia bankedo por la okuloj ! »

« Sed la plej valora juvelo troviĝis sur la frunto de la krono. Ĝi estis brilanto granda kiel juglando. Neniam mi songis eĉ pri io simila. Jam mi ne memoras ĉu ĝia nomo estas Kohinor aŭ Orlov, aŭ io alia, sed mi estas certa, ke ĝi estas unu el la plej grandaj brilantoj ekzistantaj en la mondo. »

« Subite okazis io neatendita. Tra trueto sur la

kolora kurteno kiu kovris la fenestron, sunradio eniris, kaj tuis la kronon. Ĝi tuŝis precize la gigantan diamanton. Sammomente centoj da delikataj strioj de ĉielarkoj kovris la murojn kaj la plafonon de la ĉambreto. Subite ni jam ne troviĝis en senornama griza ĉambreto. Ni staris meze de luksa salono kun centoj da ĉielarketoj kiuj multobligis la dimensiojn de la ejo, kaj kreis la ĝustan etoson por la observado de la imperiestra krono. »

« Jen, Sita, tiu ĉi estas la plej altvalora el ĉiuj miaj ĉielarkoj. Kaj mi devas al vi konfesi, ke por mi ĝi valoras pli ol se mi posedus la brilanton mem. Ĉar havante la juvelon, mi ĉiam timus ke iu ĝin forŝtelos de mi. Kaj krome, eble neniam mi sukcesus plu per ĝi krei tiel riĉan aron da ĉielarkoj. »

« Vere, sinjoro, mi kredas ke vi estas tre riĉa ! Mi envias vin. »

« Ho, ne, ne diru tion, » mi rifuzis la flaton kun modesta rideto. « Eble iam ankaŭ vi povos fari vian propran kolekton, kaj fariĝi eĉ pli riĉa ol mi. »

« Sed ne kredu, » mi daŭrigis post ioma paŭzo, « ke ĉiuj ĉielarkoj el mia kolekto estas altvaloraj. Estas en ĝi ankaŭ kelkaj kiujn mi kolektis nur pro strangeco. Estas inter ili, ekzemple, unu komika

ĉielarko. »

« Komika ? Kiel povas esti ĉielarko komika ?  
Rakontu, sinjoro. »

« Jen kiel okazis. Mi dormis en la sama ĉambro kun miaj gepatroj. Estis somermeza frumateno. Tra fendo apud la kurteno penetris iom da sunradioj, kiuj inundis la ĉambron per milda oranĝkolora duonlumo. Mi estis kuŝanta surdorse. Subite mi rimarkis sur la plafono kolorajn striojn. Post ioma observado mi konstatis, ke temis pri vera ĉielarko, en kiun endeseĝniĝis vico da montetoj, barante tiel partojn de kelkaj koloroj. »

« Mi fariĝis scivolema. Mi ĉirkaŭrigardis serĉante la fonton de la stranga ĉielarko, sed ne sukcesis malkovri ĝin. Mi klopodis fari logikajn deduktojn pri la direkto de la radioj. La serĉado de meblo kun dentumita rando restis senutila. Longe mi kuŝis sendorma, cerbumante. »

« En certa momento mia patrino vekigis. Kaj tio ĉion ŝanĝis. »

« Per sia unua movo ŝi elstreĉis la brakon al la nokta tableto, kaj el la glaso kun akvo ŝi elprenis sian falsan dentaron. Dum tiu operacio la ĉielarko malaperis de la plafono. Tuj poste ĝi reaperis vigle ondumanta, sed... sen la serio de montetoj. Jen estis la solvo de mia enigmo : komika ĉielarko

kreita en glaso da akvo kaj borderita per falsdentaro ! »

Mia kunvojaĝantino ekridis jam antaŭ la fino de la rakonto. Ŝi divenis la finon kaj ĝi amuzis ŝin. Nun ni kune ridis.

« Sinjoro, » ekparolis la knabino post momento.  
« Mi ŝatus kolekti ĉielarkojn. »

« Ĉu vere ? »

« Ho jes, mi tiel ŝatus... Sed kiel komenci ? Al vi estis facile komenci, vi ja havis fraton ! »

« Kiel komenci ? Jes, tio estas problemo, » mi diris penseme. « Tamen, mi havas ideon, Sita. Ekrigardu tra la fenestro. »

Ni klinis nin trans la fenestro, kaj mi indikis per la fingro al la ĉielarko, kiu fidele akompanadis ankoraŭ la vaportufon sub la lokomotivo. Kiam Sita rimarkis ĝin, ŝi ekkriis pro ekscitiĝo.

« Ĉu ĝi plaĉas al vi, Sita ?... Ĉu vi ne kredas, ke ĝi taŭgus por komenci vian kolekton per ĝi ? »

« Belega ĝi estas. Mi volus per ĝi komenci, sed kiel ? »

« Jen kiel. Ni ŝanĝu la sidlokojn, tiel ke nur vi povu vidi ĝin. Mi promesas ne plu elrigardi tra la fenestro, kaj ĉar la suno baldaŭ subiros, vi estos la

lasta kiu ĝin vidos. Ĝi restos nur via. La unua en via kolekto. »

« Vi estas vere bonkora, sinjoro. Sed tiu ĉi belega ĉielarko tiam mankos el via kolekto. »

Malpeze mi svingis la manon antaŭ mia vizago :

« Ho ne zorgu, amikino, mi ne bezonas ĝin. Mi jam havas similan en mia kolekto. »

Dum duonhoru Sita fikse rigardadis tra la fenestro. Sur ŝia vizaĝo intensa koncentriĝo estis videbla. Jes, la proceso de la ekposedo de la unua ĉielarko ĉiam estas akompanata de psiĥaj konvulsioj. Eĉ de fizikaj doloroj kelkfoje.

Subite la patro de Sita ektiris ŝin je la brako. Ni estis atingintaj la stacion kie ili devis forlasi la trajnon. Ni adiaŭis. Mia eta amikino brilis pro feliĉo.

Kaj ekde tiam mi ĉiam dum la vojaĝoj rigardadas tra la fenestro de la vagonaro. Mi tre dezirus denove vidi tian ĉielarkon, por meti ĝin en mian kolekton.

Ĉar, vi ja povis supozi, ke tian ĉielarkon mi ne havis ankoraŭ en mia kolekto. Mi mensogis al Sita nur por ke ŝi akceptu la donacon sen konscienciproĉo.

## Dimanĉo Montreale

Vizitu nian urbon per ĉarma video



## Malferma Tago de UEA :

Spekteblas rete !



# Esperanto-Societo Kebekia | Société québécoise d'espéranto

La Riverego estas eldonata de la Esperanto-Societo Kebekia kvarfoje dum la jaro : marte, junio, septembre kaj decembre. Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem. Oni rajtas kopii la artikolojn, kun nepra indiko de la fonto. Senpage por la membroj de la ESK. UEA-kodo de la Societo: kebk-d.

**Redaktado kaj grafiko** : Yevgeniya (Ĵenja) Amis (riverego(ĉe)esperanto.qc.ca). **Korektado kaj lingva konsilado** : Silvano Auclair, Francisko Lorrain, Bob Williamson. **Estraranoj de ESK** : Nicolas Viau (prezidanto), Suzanne Roy (vic-prezidanto), Sylvain Auclair (sekretario-kasisto), Joel Amis (konsilanto), Normand Fleury (konsilanto).

La Riverego (Le Fleuve) est publié par la Société québécoise d'espéranto quatre fois par année, en mars, juin, septembre et décembre. Dépôts légaux aux Bibliothèques nationales du Canada et du Québec. Premier trimestre 1986. ISSN 1923-1067. Le contenu des articles est sous la responsabilité des auteurs. La reproduction des articles est permise, avec mention obligatoire de la source. Gratuit pour les membres de la Société québécoise d'espéranto.

**Rédaction et graphisme** : Yevgeniya Amis (riverego(à)esperanto.qc.ca). **Correction** : Sylvain Auclair, François Lorrain, Bob Williamson. **Administrateurs de la SQE** : Nicolas Viau (président), Suzanne Roy (vice-présidente), Sylvain Auclair (secrétaire et trésorier), Joel Amis (conseiller),

Limdato por la venonta eldono / Échéance pour le prochain numéro : 2020.08.20

6595, rue Briand, Montréal H4E 3L4 | info(ĉe)esperanto.qc.ca • www.esperanto.qc.ca

En plus de la Société québécoise d'espéranto, il existe au Québec plusieurs clubs d'espéranto. Pour ajouter votre club à cette liste ou annoncer une activité, écrivez-nous à riverego(à)esperanto.qc.ca

**Vizitu nian retejon !**

**Visitez notre site web !**

www.esperanto.qc.ca



Aliĝu tuj, se vi volas esti gastiganto kaj bonvenigi esperantistojn ĉe vi :

**www.pasportaservo.org.**

Vi povas ankaŭ kontakti Jed-on Meltzer <jedmeltzer@gmail.com>, kiu estas la peranto por Kanado.